



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj  
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA

## NI NE HALTOS

Nia lasta numero publikigis Alvokon al la kataluna esperantistaro, kiu ĝis nun ne trovis sufiĉan aŭskulton. Nur la Grupo Esperantista de Vic respondis kun entuziasmo kaj aligis siajn membrojn al K. E. F. Tiu rezultato ne mirigas nin ĉar ne la unuan fojon ni spertas, kiom la katalunaj esperantistoj malatentas ĉiun paŝon al harmonia kunlaboro. Dum nia longa batalado por Esperanto ni havis okazon konstati plurfoje, ke en nia lando la esperantistoj dormas profunde kaj ke nenio sukcesas vekti ilin. Iu povus supozi, ke K. E. F. ne ĝuas simpatian kaj ke la batalantoj preferas labori sur aliaj kampoj sed tio ja ne okazas ĉar la esperantistoj ne laboras kun ni nek kontraŭ ni. Certe ni ne bedaŭrus la malkuraĝigan rezultaton de nia Alvoko, se ni povus konstati, ke la entuziasmo fluas sur aliajn organizojn. Tial ni ne devas forlasi niajn postenojn: ni daŭrigos sur ili dum ni ne trovos taŭgajn anstataŭantojn. Se ni ne farus nian taskon, neniu alia farus ĝin.

Sed ni volas fari averton al la katalunaj esperantistoj kaj precipe al tiuj, kiuj iafoje plendas, ke la Federacio faras nenion: K. E. F. energie rifuzas ĉiun kritikon de tiuj, kiuj nenion faras kaj inside parolas pri ĝi. Ni iros plu nian vojon kaj ne haltos. Ni estas harditaj en la laboro. Miloĵ da semoj perdiĝas, ni tamen semos kaj semos. Ducent batalantoj prok-

simume staras apud ni. Kun tiu malgranda armeo ni iros kurage antaŭen. Ni ne forlasos la standardon. Ĝi, t. e. K. E. F., estas malgranda sed meritas nian tutan koron.

## Catalunya i el XXVI.<sup>e</sup> Congrès Universal d'Esperanto celebrat a Estocolm

### *Preliminar*

Honorat per la Federació Esperantista Catalana, per a representar-la en el XXVI Congrès Universal d'Esperanto, celebrat enguany a la capital de Suècia, durant els dies 4 a l'11 d'agost, tinc el deure de fer públiques les impressions cospades en el viatge a Estocolm i durant el Congrès, des del punt de vista de català i d'esperantista alhora.

### *França i Bèlgica*

Fa dos anys que el Congrès es celebrà a París. Des de llavors havíem obtingut l'amistat d'alguns bons amics francesos, compenetrats amb l'esperit que informava els catalans, de voler presentar-se davant els representants dels altres països, amb personalitat pròpia i completament diferent de l'espanyola. No ens fou permès, llavors, això, ja fos per la pressió que exerciren els delegats espanyols en els directius, ja fos perquè aquests tenien un concepte massa imperialista dels Estats.

En la nostra breu estada a París, enguany, hem saludat alguns d'aquests amics esperantistes que s'interessaven pel moviment català, fent-nos patent el seu desig que Catalunya pugui ésser definitivament mestressa dels seus destins.

Camí de Bèlgica, ens sorprèn la notícia de l'assassinat de Dollfus. En arribar a Brusselles totes les conversacions giren entorn d'aquell exacrable fet i també de la pintoresca arribada a aquella capital, del rei de Siam.

Trobem alguns esperantistes que ens diuen que aniran a Suècia agregats a la caravana francesa.

L'assumpte lingüístic ens interessa, i per això notem la davallada del francès a mida que ens acostem a la frontera holandesa. Pot dir-se que tan generalment és parlat el francès a Brusselles, com el flamenc a Anvers. En aquest darrer lloc, en visitar el seu magnífic port, tenim ocasió de comprovar els

estralls de la crisi, puix que bona part de l'utilitatge modern que hi ha, resta paralitzat per manca de mercaderies a carregar i descarregar.

### *Holanda, país dels canals i de les bicicletes*

Rotterdam i Amsterdam se'ns presenten com a grans ciutats modernes, unides amb les altres ciutats del territori per l'espessa xarxa de ferrocarrils que travessa el país. A Amsterdam, pocs dies abans havien ocorregut greus successos degut a la reducció del subsidi als sense feina; però llavors ja tot aparentava calma, enmig de l'aigua calmosa dels seus canals.

Pot dir-se que tots els habitants dels Països Baixos van en bicicleta, incluint-hi la família reial, els vells generals amb uniforme de gala i el pit ple de condecoracions, els pastors protestants, les mainaderes, i les dones de món, sense oblidar que els holandesos festegen les donzelles anant en bicicleta també. Aquesta afecció extraordinària a la bicicleta, es comprèn si es té en compte que de nord a sud el país és completament pla. La monotonia del paisatge, sense muntanyes com les de Catalunya, que alegren la vista del viatger, és poc compensada pels nombrosos canals que creuen el país i els molins de vent situats enmig dels immensos prats.

La Haia és altra població digna de visitar-se, amb les mateixes característiques que les altres, llevat d'un cert aspecte aristocràtic que li dona l'estada de la família reial.

En l'aspecte lingüístic, ultra l'holandès, naturalment, en els hotels i en les grans botigues es parla l'alemany, l'anglès i el francès; però ni per casualitat en trobarem alguna on es parlés el castellà.

### *Cap a Suècia*

El dia 1 d'agost és el fixat per embarcar la caravana holandesa. En el moll de Hoek van Holland, i a bord del magnífic i ràpid vaixell «Princesa Juliana» que enarbora en el màstil més alt la bandera de l'Esperanto, a proa la neerlandesa, i a popa la sueca, ens reunim 200 esperantistes de diversos països (la majoria holandesos), i de diverses professions, però principalment mestres, enginyers i oficinistes.

Quan l'hèlice del vaixell comença a funcionar, a coberta hom entona l'himne esperantista, secundats per la gent que hi havia al moll, que vingueren a acomiadar-nos. És la primera vegada, en els annals de l'Esperantisme, que s'ha pogut nolicjar

un vaixell exclusivament per assistir a un Congrés. Això demostra — com féu remarcar Jakob Telling, l'entusiasta organitzador de la caravana, en el seu discurs de salutació — que l'Esperanto segueix un camí ascendent.

Encara albiràvem les platges neerlandeses, quan m'adono que un senyor gros, que em sembla reconèixer, atreia l'atenció dels viatgers entre rialles i comentaris xirois. M'atanso, i, en efecte, tinc ocasió de saludar el delegat espanyol. Les seves mans encara estan plenes de postals amb «toros» i toreros, dones que toregen, manoles, etc., que reparteix entre un públic de diverses nacionalitats. Em diu que només en té... 2,000 per repartir.

En aquest sentit nosaltres hem estat més modestos, potser en excés: únicament donàvem postals amb vistes de Barcelona als qui ens ho demanaven o ens oferien postals de llur país. Bé prou que el delegat espanyol, inconscientment i malauradament haurà fet «propaganda» de la seva per a nosaltres també. Això solament podrem evitar-ho quan sigui possible manifestar-nos plenament amb fesomia pròpia, deslligada dels altres indrets de la Península.

Amb el fi de fer agradosa l'estada a bord, durant els tres dies d'anada, s'havia organitzat un programa de festeigs consistents en concerts, conferències i jocs diversos, així com mitja hora de «Diari parlat», en el qual es comunicaven els principals fets ocorreguts a Europa durant el dia.

El vaixell lliscava ràpidament per la Mar del Nord, tranquil·la en aquells dies. Vorejant la costa alemanya, passem per davant la desembocadura de l'Elba, i seguidament entrem en el canal de Kiel, de 98 quilòmetres de llargada, que uneix la mar del Nord amb la mar Bàltica, escurçant considerablement la ruta marítima del golf de Bòtnia, en evitar recórrer en la seva totalitat la costa danesa.

Als crits de joia que llancen els expedicionaris, tot fent voleiar els mocadors, quan s'obren i es tanquen darrera nostre les comportes del canal, i quan passem per dessota dels grans ponts de ferro que travessen el canal, els deixebles de Hitler, amb serietat que sembla tràgica, responen amb la rígida salutació feixista. Travessant el canal precisament, en territori alemany, ens és comunicada la mort del President Hindenburg, i hom posen tot seguit les banderes a mig pal.

Passat el canal, ja en la mar Bàltica, tot el trajecte es fa interessantíssim, albirant a un i altre costat un sens fi de petites illes amb exuberant vegetació.

*Suècia, país modern*

La Suècia d'avui no és en cap manera aquella de Carles XII, sinó la de l'inventor dels llumins i dels fars automàtics; no és la Suècia de Linné, sinó la de cent mil enginyers, dels quals la meitat és al seu país, mentre l'altra meitat dirigeix, en altres països, milers de sucursals que la indústria sueca hi té establertes.

Suècia no té més que uns sis milions d'habitants, als quals la història (mil anys de guerres), ensenya que si vols arribar allà on et proposes, cal que avancis amb els punys ben tancats. I tots aquests enginyers suecs, uniformement abillats en blau marí, d'ulls blaus i calbs ja als trenta anys, procuren seguir aquell precepte; però cap d'ells no demanaria per entrar, per exemple, a l'Acadèmia espanyola de Menéndez i Pidal.

Els reis, en les tres monarquies escandinaves, no poden imposar llurs opinions si no per la persuasió. Malgrat llurs democràtics costums, temen que algun dia pot esfondrar-se tot, i, com a precaució, tots els prínceps i princeses tenen un ofici.

El Govern socialista de Suècia admira el seu rei. Com és això? Penseu només que l'importador a aquell país de les màximes de Marx, H. Branting, era un company d'escola del rei; i quan aquell gran home polític, socialista i republicà, morí, el rei Gustau V presidia el dol nacional de l'amic de la infantesa desaparegut. No és d'estranyar, doncs, que els socialistes suecs no demanin la retirada del rei. Però, i els comunistes?... —hom es pregunta. Són molt nombrosos a Suècia: tenen vuit representants al Parlament i mai no han dit un mot d'ofensa al rei. Ells procuren ignorar-lo i no s'atrevirien anomenar-lo «tirà del poble», perquè el poble, socialistes i tot, riuria.

*Estocolm, ciutat del Congrés*

La capital de Suècia tingué el seu origen en una d'aquestes minúscules illes que es troben a milers en la part occidental de la mar Bàltica, al costat del llac Malären, formant l'arxipèlag suec. Avui dia la ciutat ocupa diverses illes, unides per un sens fi de ponts. El nombre d'habitants és d'uns 600,000, o sigui el 10 per 100 de la població total de Suècia. Conté magnífics edificis i esplèndids comerços. El caràcter franc i liberal per excel·lència dels seus habitants, us captiva. Pels nombrosos canals que hi ha, és anomenada també la Venècia del nord.

*Els actes realitzats*

Molts esperantistes suecs ens esperaven en el moll d'Estocolm. Després de les salutacions i visques de rigor, ens acompanyaren cap al Parlament, que pel Govern havia estat posat a disposició dels congressistes.

L'obertura del Congrés fou solemne. El ministre delegat pel Govern suec, representants de 36 nacions i els directius del moviment esperantista mundial, ocupaven la presidència. El senyor Edmond Privat, des de Ginebra, féu un discurs per telèfon que fou radiat i sentit en immillorables condicions. Salutà els congressistes allí reunits, i recalçà que havia d'inspirar les tasques del Congrés l'esperit que inculcà a l'Esperanto, en els seus començos, el nostre plorat mestre Dr. Zamenhof, fent possible la unitat dintre la diversitat i la diversitat dintre la unitat.

Foren nomenats, per a saludar el públic, els representants de tots els països que assistien al Congrés, i en aquesta avinentesa, els noms de Catalunya i de Barcelona foren aplaudits pels 2,000 congressistes dels més apartats indrets del món que emplenaven la sala.

Els dies i les hores de la setmana en què durà el Congrés, foren convenientment distribuïts entre les tasques culturals, reunions de l'Associació Esperantista Universal i les excursions i altres esbargiments.

A remarcar, el concert de cançons populars sueques donades per la massa coral de Dalecarlie, abillats, els seus components, amb els vestits típics del país. L'estrena de la primera pel·lícula de llarg metratge parlada en Esperanto, impressionada als importants estudis cinematogràfics nòrdics. La presentació de la primera obra teatral escrita directament en l'idioma universal. L'excursió per l'arxipèlag, visitant Saltsjöen i el seu Observatori, i presenciant les curses de canots. Diverses conferències il·lustrades amb pel·lícules i diapositius sobre diferents països, principalment de la Lapònia i d'Itàlia, per ésser tocant a Suècia la primera, i per haver-se de celebrar el vinent Congrés a Roma, relatiu al segon.

Els Consells de l'Acadèmia Esperantista. La visita al Parc-Museu Skansen, on es ballaren danses populars dels països del Nord. Discussions públiques entre la joventut sobre els problemes dels temps actuals. La visita a la ciutat de l'eterna joventut: Upsala, amb la seva important Universitat, Biblioteca i Catedral. Finalment, com a comiat, el ball internacional en el

Saló Blau del magnífic edifici que l'Ajuntament d'Estocolm posseeix.

Cal fer constar que dos dels diaris més importants, durant tota la setmana, publicaven una pàgina redactada en Esperanto.

### *L'oposició en U. E. A. vencé*

Si algú dubtés encara de les possibilitats de l'Esperanto com a veritable llengua viva, l'assistència al Consell de Treball de l'Associació Esperantista Universal (UEA), sens dubte l'hauria convençut del seu error. En farem un resum per l'interès que pot tenir per als esperantistes de casa nostra.

Després de les remarques inicials del secretari general senyor Kreuz, el general Bastien, com a President del Consell, s'expressà en termes moderadors i aclaridors de la reunió tinguda el dia abans, dient que per sobre de tots els interessos personals calia posar-hi l'interès de l'Esperanto mateix.

Diversos aclariments feren els senyors Goldsmith, Isbrucker i Orengo. El senyor Petit (França), presentà el pla d'actuació del nou Comitè, i el President llegí els noms dels nous directius de UEA: President: general Bastien; Vice-president, senyor Isbrucker; Membres: Srs. Malmgren, Orengo, Steiner i Vogt. Tot seguit començà una vigorosa i fins apassionada discussió, sobre si l'elecció havia estat encertada o no, que motivà la intervenció de la Srta. Lídia Zamenhof, la qual, en vibrants paraules apaivagà els ànims i demanà que es treballés tenint sempre present la idea que inspirà el seu pare en crear l'Esperanto. L'ex-president senyor Stettler demanà que fos aprovat el nou Comitè, com així es féu, i cantant l'himne esperantista, el Consell, que en començar amenaçava ésser tumultuós, finí amb harmonia i pau.

Per sintetitzar en poques paraules la situació, direm que dels dos bàndols que des d'anys es disputen la direcció del moviment esperantista universal, ara han vençut aquells l'esperit dels quals està més en consonància amb els temps actuals. Dependrà dels nous dirigents i de tots els esperantistes en particular, el que l'Esperanto pugui arribar al lloc que cadascun d'ells desitja.

Mentrestant, podem afirmar que el moviment esperantista creix, malgrat totes les dificultats i les crisis polítiques i econòmiques actuals. Les actuacions i els actes dels esperantistes són respectats avui arreu del món, i àdhuc vists amb simpatia, fins per aquelles nacions que antany n'havien blasmat, com la mateixa Itàlia, a la capital de la qual ha de celebrar-se el pròxim

Congrés Universal, l'any vinent, i que a jutjar per les manifestacions dels delegats italians i per la propaganda que ja porten feta, serà quelcom imposant.

R. CABEZA

## El «Curs Complet» per Jaume Grau Cases

Podem cantar victòria de posseir ja un llibre en la nostra *primera* llengua per a aprendre-hi la *segona* de tothom.

El nostre poeta sap cantar com el rossinyol i treballar com la formiga, gràcies a la flama d'un ideal, d'un gran ideal. Si ningú necessita l'estímul d'un ideal és un poeta. Però si es troben, el poeta i l'ideal, tots dos treuen la grossa: l'ideal fa la felicitat del rossinyol, i el poeta fa de formiga per a la causa. Així podem comprendre la tasca de Jaume Grau Cases, català esperantista. I la tasca d'un J. Baghi, hongarès esperantista, ambdós tan poetes i ambdós tan eficients!

El *Curs Complet* — ja publicat! — és una benedicció per als qui volen ensenyar i per als qui volen aprendre l'Esperanto a Catalunya. Potser presenta una mica massa d'ordre gramatical; però manca sentit pedagògic general i sobra rutina escolar antipedagògica, pel fet que la majoria dels mestres ensenyen antipedagògicament; i així hi estem avesats, i no tothom ha pogut refer l'instint pedagògic torçat justament a les escoles; i, doncs, la immensa majoria dels interessats s'entendran millor amb un llibre no massa allunyat del costum o moral general. Però dintre aquesta modalitat, el *Curs Complet* és ben recixit i de la màxima garantia. Perfecte, no hi ha res en el món. En aquest llibre trobem, tant en el capítol dels adverbis, com en el vocabulari esperanto-català, «baldaŭ» traduït per «prompte», i «prompte», en català, només pot ésser adjectiu. L'adverbi català corresponent a «baldaŭ» és «promptament» o «aviat». Però això pot ésser una errada, una badada, per a un mestre de català. Per a l'eficàcia esperantista del *Curs Complet*, això no compta.

Els alumnes i els professors d'esperanto hauran de tenir present que l'eficàcia màxima consisteix a aprendre i ensenyar les frases fetes, — els mots fora de les frases essent morts. Les regles gramaticals i els vocabularis, *a posteriori*, són molt útils; però, *a priori*, són de resultats positius en casos ben comptats. Per aquesta raó el *Curs Complet* conté força exercicis fraseolò-



gics, que hauran de constituir el tall o el gra de l'apat de cada lliçó.

L'aspecte de la coberta del *Curs Complet* desdiu un xic de l'excel·lent contingut. Però el preu és, 3,50 pessetes, la causa determinant d'haver sacrificat l'aspecte del llibre a favor de l'economia dels esperantistes. En efecte, no hi ha cap llibre qualitativament i quantitativament comparable amb el *Curs Complet* d'Esperanto que avui gaudim en català, que no resulti a un preu força més elevat.

I bé; cal, ara, que cuitem tots a fer fruitar la bella llavor que per a la nostra causa representa l'obra tan diligentment i intel·ligentment acomplida pel nostre company Jaume Grau Cases, punta<sup>1</sup> màxim de l'esperantisme literari català.

DELFI DALMAU

## XIV Kongreso de S. A. T. en Valencio

Spite la mondkrizo kaj ties cirkonstancoj, laboristoj de dektri landoj renkontigis en Valencio ĉe la XIV Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda.

La Kongreso okazis de la 3-a ĝis la 8-a de aŭgusto. Aliĝis entute 432 kongresanoj (19 landoj), el kiuj ĉeestis 376 (13 landoj).

Multaj kongresanoj haltis en Barcelona dum sia vojaĝo suden. La nederlanda karavano, kiu konsistis el preskaŭ 100 personoj, alvenis Barcelona vespere la 2-an de aŭgusto. Ili estis enloĝigitaj en la ĝardenoj de la palaco «Belles Arts» dank' al la klopodoj de samideano Ferran Montserrat. La karavananoj plurestis ĝis la morgaŭo nokte. Ili vizitis la urbon akompanataj de multaj kamaradoj.

La plimulto de la kongresanoj alvenis al la kongresurbo jam la trian de aŭgusto. Afablaj deĵorantaj organizantoj prizorgis la gvidon de la kongresanoj al la Akceptejo, kiu aspektis ŝtopita de kamaradoj, ĉu dezirantaj la koncernan kongresmaterialon, ĉu ian klarigon aŭ oportunan loĝejon.

La kvaran, tagmeze, okazis akcepto de la kongresanoj en la Urbdoma Halo kun intersanĝo de salutoj de k-do Azorin, nome de la Kongreso kaj de la urbestro de Valencio; ĉe la ŝtuparo okazis komuna fotografado. Posttagmeze, k-dino Eli-njo Pähn el Estonio prelegis en sindikatejo «Dependència Mer-

cantil» pri la moderna soveta literaturo. Vespere okazis alia prelego, tiu de k-do Jaime Grau Casas el Barcelona. Ĝi temis pri Kataluna Antologio kaj hispana literaturo. Nokte oni povis admiri belajn artofajraĵojn ĉe promenejo Alameda.

Dimanĉe, la kvinan, matene, okazis vizito al la diversaj muzeoj, kaj poste la malkovro de la stratabulo de Dro. Zamenhof. Parolis reprezentanto de la urbo kaj la prezidanto de la O. K. K., k-do Hernández, kaj muzikistaro plibeligis la solenaĵon. Posttagmeze, preskaŭ ĉiuj kongresanoj ĉeestis tipan Valencian Florbatalon, kiu povis esti rigardata de speciala rezervita loko. Samtage, nokte, okazis la solena malfermo de la Kongreso en la Universitato. Impona estis la aspekto pro ĉeesto de pli ol mil personoj. K-do Hernández salutparoladis por la O. K. K. kaj sekvis la salutojn de la diversaj reprezentantoj. De tempo al tempo la orkestro de la loka Laborista Esperantista Grupo plezurigis la ĉeestantojn per rave luditaj muzikaĵoj.

La sesan de aŭgusto, lunde, okazis la unua laborkunsido, en la Koncerta Domo. Oni legis la salutojn kaj leterojn ricevitajn, oni elektis la sekretariaron kaj k-do Bartelmes raportis pri la tasko de la Plenum-Komitato, kiu estis aprobata. Posttagmeze jam okazis diversaj fakaj kunvenoj; tiu de la komunistoj ne povis efektiviĝi pro polica malhelpo. Ankaŭ estis organizata aŭtobusa ekskurso al Cullera, 42 km. malproksima de Valencio. Tre sukcesa kaj distroplena estis tiu ekskurso al tiel pitoreska vilaĝo ĉe la maro. Dum la vojaĝeto oni povis konstati kiel riĉa kaj bela estas la valencia kamparo.

Vespere, la saman tagon, oni havis, ankaŭ en la Koncerta Domo, la Muzik-Literaturan Vesperon. Inter la belaj muzikaĵoj luditaj de la Esperantista Orkestro de la L. E. G., k-do Bartelmes, el Parizo, prelegis pri la oportuna temo «La muziko kiel homa esprimilo». Poste sekvis reprezentado de la teatraĵeto «La kreitaj profitoj» de J. Benavente kaj la agrabla festo finiĝis per kantado de «La Internacio».

La sepan de aŭgusto okazis la dua laborkunsido kun vigla debato pri diversaj proponoj. Oni akceptis sendi kongresan rezolucion al Sovetio. Oni elektis Parizon kiel kongresurbon por 1935. Posttagmeze la kongresanoj ĉeestis diversajn fakajn kunsidejojn; liberpensuloj, instruistoj, socialistoj, virinoj, k. t. p. Vespere k-do Pâris paroladis en sindikatejo «Gaso, Akvo kaj Elektro» pri la temo «Edukado de laboristaj gvidantoj» kun ĉeesto de multaj neesperantistoj. Ĉe la fino fariĝis vigla diskuto, partoprenata precipe de neesperantistoj; la tradukoj, do, svarmis.

La lastan kongrestagon multaj kongresanoj jam foriris, kiel ekzemple la nederlanda karavano. Sed ankoraŭ estis organizata dum la mateno ekskurso al ĉarma pinarbaro Saler.

Vespere, en kafejo, la lastaj kongresanoj ĝis malfrua nokto ankoraŭ volis kunveni por lasta adiaŭo kun fortega ĝisrevida deziro en Parizo, la urbo de la XV S. A. T. Kongreso.

Nun ree ŝpari dum la tuta jaro por havi la ŝancon vojaĝi malproksimen, al la Pariza Kongreso, tie kie kamaradoj, laboristoj ĉieaj, celos kunveni ankaŭ, renkontiĝi por interfratiga laboro, por plua tasko kunlabori por la progresigo de racia vivo. Spite kiu ajn tempesto, jen staras S. A. T. kvazaŭ vojo kondukanta al alia mondo pli konscia kaj vivinda ol la nuna. Ĉiu povas, do, serĉi la vojon... kaj laŭiri ĝin. Kuraĝon!

JOSEP BANET

## XVI.<sup>aj</sup> INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

### ORDINARAJ TEMOJ

#### *Originalaj Tekstoj*

- I Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II Originala Ama verko en prozo.

#### *Tradukitaj Tekstoj*

- I Traduko de unu el la versaĵoj de la konata kataluna poeto Joan Maragall.
- II Traduko de la kataluna rakonto «Sobre la mandra...», de Prudenci Bertrana. Vidu ĝin en la numero 200-201.

### EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I Premio de la Urbeŝtaro de Ripoll, 100 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- II Premio de la Prezidanto de K. E. F., 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- III Premio de la Estraro de K. E. F., 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- IV Premio de KATALUNA ESPERANTISTO. Dumviva abono al la gazeto. Temo: Kiel oni faras bonstilan versan tradukon.

V Premio de la grupo «Paco kaj Amo», 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

VI Premio de la grupo «Barcelona Stelo», 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

VII Premio de «HEROLDO DE ESPERANTO» (ankoraŭ difinota) de valoro de proksimume 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

VIII Premio de «LITERATURA MONDO», ekzemplero de *Enciklopedio de Esperanto*, ilustrita eldono, bindita en du volumoj. Temo: originala novelo.

IX Premio de «LITERATURA MONDO», jarkolekto de 1932. Temo: Originala poemo.

X Premio de «LITERATURA MONDO», jarkolekto 1934. Temo: Originala poemo.

XI Premio de «Esperanta Grupo Vic», 50 pesetoj. Temo: Komedieto kun kvin roloj.

XII Premio de «Espero Katolika», dujara abono al la gazeto. Temo adekvata al la karaktero de la gazeto.

Novajn premiojn kaj temojn ni anoncos en venontaj numeroj de KATALUNA ESPERANTISTO. La Sekretario, Joan Gili Norta.

## BIBLIOGRAFIO

Adresaro eldonita de Orienthispana Esperantista Federacio. Adreso kaj prezo ne montritaj. 32 paĝoj, 15×11.

Ĝi enhavas la regularon de Hispana Esperantista Konfederacio kaj tiun de la nomita Federacio. Krom tio ĝi publikigas skizon pri diversaj grupoj en la Valencia teritorio kun la nomoj kaj adresoj de la diversaj grupanoj.

Konsiloj Sugestoj de malnova esperantisto. Aŭtoro Andrés Piñó, 56 paĝoj, 17×13. Prezo ne montrita.

Nia fervora samideano ĉerpis el sia mola koro travivitajn spertojn kaj donis al ni en bela broŝuro saĝajn konsilojn kaj bonajn vojojn. Sed la homoj ne estas kaj kompreneble la esperantistoj, ne estas tiel bonkoraj kaj sindonemaj kiel nia malnova batalanto Piñó kaj liaj Konsiloj en multaj flankoj ŝajnas tro naivaj. El liaj konkludoj unuj estas trafaj, aliaj praktike neblaj. El lingva vidpunkto ni povus fari kelkajn kritikojn, kiuj tamen meritas indulgon pro la fervoro kaj entuziasmo de la verkinto.

Gösta Berling. Selma Lagerlöf: Trad. Stellan Engholm. Ilustrita de Einar Nerman. 552 × 16 paĝ. Prezo broŝ. sved. kr. 6:—, bind. 7:50. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm.

La granda sveda poetino kaj verkistino Selma Lagerlöf, nobelpremiitino, jam estas konata al la tutmonda esperantopubliko per kelkaj el ŝiaj pli malgrandaj verkoj, eldonitaj de la sama eldonejo. Nun prezentigas ŝia unua ĉefverko, per kiu ŝi gajnis sian mondfamon.

En Gösta Berling la aŭtorino majstre pentras ne nur la vivon de la bela sveda provinco Vermlando kaj la ticajn bravajn, harditajn homojn, sed ŝi montras, kiel en ĉiu homo, eĉ la plej simpla, malriĉa kaj mizera, estas troveblaj bono kaj eĉ heroeo, oferemo kaj amo. La heroo de la libro estas geniulo, bonkora sed malforta kaj ŝanĝema laŭ karaktero. En sia verko Selma Lagerlöf ne nur analizas la profundojn de la homaj animoj, sed ŝi montras per klaraj kaj vivoplenaj bildoj la brilan vivon sur la Vermlandaj bienoj kaj ankaŭ la dolĉan iom mistikigan naturon de Vermlando, kie vivis multego da legendoj.

La eldonejo havis la bonŝancon, igi unu el la plej famaj artistoj de Svedujo, Einar Nerman, illustri la verkon per belegaj tutpaĝaj bildoj. La broŝurita eldono havas kvarkoloran kovrilon laŭ desegnaĵo de la sama artisto, kaj la bele kaj fortike bindita eldono havas oran silueton de la heroo, Gösta Berling.

Gösta Berling estas la plej multe legita verko de sveda verkisto. En sveda lingvo venis 34 eldonoj kaj la verko estas tradukita en 37 lingvojn. Ĝi estas ŝlosilo de multaj el la postaj verkoj de Selma Lagerlöf, kaj la pseŭdonimaj nomoj de personoj kaj lokoj en Vermlando forte enradikiĝis.

La tradukon lerte faris la konata verkisto Stellan Engholm. La tre persona kaj poeziplena stilo de la aŭtorino donis al la tradukinto sufiĉe malfacilan taskon, sed li bone sciis konservi la vivon kaj la ĉarmon de la verko.

Engholm faras el la lingvo, kion li volas kaj ĉiam vi admiras kiel bele li kunmetas la vortojn por doni ĝustan nuancon. Iom ŝokas la konstanta allaso de infinitivo post prepozicio «sen». Ni trovis ankaŭ *pri ami*. Malmultajn preserojn ni kalkulis. En ties listo mankas citi tiujn de paĝo 281, linio 10 (supre), kie oni uzas erarajn akuzativojn kaj la samon ni diras pri p. 465, l.9; en p. 507, l.19, duobla pronomo. Granda verko kaj granda tradukinto. Nur gratulon ni povas esprimi.

Bildkartoj de Carl Walter, Graf Spee-Str. 24, Berlin W 35.

Serio de tri bildkartoj por plifaciligi la komprenon de la sufiksoj igi kaj iĝi. Unu serio kostas M. 0.15 aŭ unu respondkuponon.

Vic. — Publicació artística anyal. Seleccionada i editada per «Amics de la Ciutat».

Ni ricevis kun granda surprizo ekzempleron de la nomita gazeto, lukse eldonita laŭ la plej modernaj postuloj de l'pre-sarto. Ĝi ne nur la urbon Vic honoras sed Katalunujon ankaŭ. Sur la luksa papero belaj fotografaĵoj prezentas la plej reliefajn trajtojn de la antikva Kataluna urbo, en kiu la arto manifestiĝas ĉe ĉiu paŝo. La tuta vivo de Vic speguliĝas sur la paĝoj de la gazeto. Tial en ĝi ne povis manki la paĝo de la esperantistoj. Ĝi estas bela foto prezentanta kelkajn ĉef-verkojn de nia literaturo kaj la plej konatajn gazetojn sur la verda flago en trafa kunmeto. Koran gratulon al Esperanto-Grup Vic kaj al ĝia patra estro pioniro J. Comella.

Lingva Kvaronhoro de Paul Nylén, eldonita en sveda lingvo de Eldona Societo Esperanto de Stockholm. 48 paĝoj 19×12, Prezo: 1 sv. kr.

Lingvaj klarigoj por svedoj, kies lingvon ni bedaŭrinde ne konas por dece recenzi la ŝajne interesan enhavon.

Ĉe doktoro. ŝalom - Alejĥem: El la hebrea lingvo esperantigita de Josef Rabinovic-Tajc. 24 paĝoj. Prezo: broŝurita gmk. 0,25. Propra eldono de la aŭtoro. Havebla ĉe «Heroldo de Esperanto», Brüsseler Str. 94, Köln, Germ.

Tre sprita rakonto, unu el la plej kolorplenaj, kiujn ni legis.

## ENLANDA MOVADO

Vic. — Je la fino de septembro okazos la edziĝfestoj de nia simpatia kaj inteligenta grupanino Fino. Luz Cuesta kun Sro. Miquel Alvarez. Esperanta Grupo Vic elkore gratulas la feliĉan paron, al kiu ĝi deziras plej daŭran miellunon.

Barcelona. — La malnova societo Paco kaj Amo transloĝiĝis al strato Salmeron, 56, la plej grava strato en kvartalo Gràcia. Tio donis novan forton al la ĉiam vigla Paco kaj Amo. Novaj kursoj organiziĝas por la komenco de oktobro.

Por la 16 de septembro estas organizita festo por soleni la XLVII Datrevenon de la apero de la unua lernolibro de Esperanto. La festo, kiu okazos en libera aero en «Font de la Mina», estos partoprenata de diversaj aliaj grupoj, kiuj kunlaboras en la organizo.

Komence de aŭgusto estis inaŭgurata en E. S. Nova Sento nova unuagrada kurso, gvidata de s-no Francisc Gimenez. Estas interesa tiu ĉi kurso ĉar ĝi komencis tiel frue, ankoraŭ en teda somero, pro insista peto de kelkaj novaj junaj membroj dezirantaj lerni la lingvon. Ne multaj partoprenas sed regas granda entuziasmo.

La sama societo, la 26-an de aŭgusto, faris peraŭtobusan ekskurson al antikva Tarragona kaj Salou. Partoprenis 33 novasentanoj. Frue, en la mateno, oni forlasis la ĉefurbon, survoje al Tarragona laŭ la marborda direkto, t. e. Sitges, Vilanova, Vendrell... Post tagmanĝo en Tarragona ni veturis ĝis Salou, bela apudmara vilaĝo kun la plej bela kataluna marbordo. Post la tagmanĝo ni forlasis la vilaĝon de kies haveno la kataluna reĝo Jako I forŝipis por almiliti Balearojn, forpeli la maŭrojn kaj katalunigi la belajn insulojn. Rec en la antikva Tarraco oni vizitis la interesegegan muzeon «Kristanromana Tombejo», katedralon kaj ceterajn monumentojn de la iama ĉefurbo, plej taŭga scenejo por kataluna kongreso. Je la naŭa la aŭtobuso denove staris en la deirpunkto. Entute rezultis tre agrabla ekskurso, kiu kontentigis ĉiun.

*La Medicina Catalana.* — Jam de antaŭ unu jaro aperas en Barcelono granda ĉiumonata teknika gazeto sub la titolo «La Medicina Catalana». Tiu gazeto estas grava pro la boneco materia de la papero, pro la nombro de la paĝoj kaj pro la kvalito de la teknikaj verkaĵoj. Tial ĝi impresis, kiam mi montris ĝin al la konferencanoj en Vieno en majo.

Ĉiuj kunlaboraĵoj kaj redaktaĵoj en «La Medicina Catalana» estas katalunlingvaj, sed de la 2<sup>a</sup> numero, estas resumoj en la ĉefaj helpaj lingvoj, Esperanto inter ili. Kaj, pli logike, tial ke latinidaj lingvanoj facile komprenas ĉiujn latinidajn lingvaĵojn, do la katalunan, tiu grava moderna medicina gazeto evoluas tiel ke apud la katalunlingvaj verkaĵoj estas pli kaj pli nur en Esperanto kaj en angla lingvo la resumoj por la universala legantaro. Tiel la resumoj simpli-

---

Kun tiu ĉi numero ni sendas ekzempleron de «La granda piramido» kaj propagandfolion de U. E. A.

gas. Ne esperantistaj kuracistoj, se ili estas hispan-, portugal-, franc-, ital. aŭ rumanlingvanoj, komprenos la katalunlingvajn artikolojn, kaj alinaciaj legantoj facile informiĝos pere de la anglalingvaj kaj Esperantaj resumoj. Se medicinisto el iu ajn lando sincere interesigas pri «La Medicina Catalana», bonvolu peti al nia adreso specimenon.

*Grenfrukto.* — Jen uzo de Esperanto, jen vera esperantismo: nutra medicinaĵo aperis sub Esperanta nomo apud la kataluna «Grafruit». Kaj ĉiuj klarigoj kaj propagando pri tiu medicinaĵo estas presitaj en kataluna lingvo kaj en Esperanto: tio estas en la natura aŭ nacia lingvo, kaj en la helpa internacia kreaĵo de Zamenhof.

Ŝajnas al ni multe pli efike por Esperanto ĝia uzo kiel plena helpa lingvo, ol uzi la nomon de nia internacia esprimilo por nur nomi komercaĵon. Tio ĝenerale miskomprenigas la signifon de la vorto «Esperanto» kaj tute ne bone sciigas pri la afero tiel anoncata.

«Grenfrukto», do, estas bona ekzemplo por tiuj, kiuj deziras esperantiste agadi en la komercado.

Kaj tiuj du faktoj montras veran progreson de nia afero en la medicinista sfero de Katalunlando. — D. D.

## ADVERTIMENT

Preguem als membres de K. E. F. i als abonats a aquesta Revista que habiten en localitats on no hi ha Delegat, que vulguin trametre'ns directament al nostre estatge, carrer de València, 245, Barcelona, i a nom de «Kataluna Esperantista Federacio», les seves quotes de membre o abonat, per mitjà del gir postal, o en segells de correu, o per l'ordinari.

L'endarreriment en percebre l'import d'aquestes quotes escampades és causa de sensibles dificultats en la nostra administració.

Recordem l'import de les quotes:

Membres isolats de K. E. F., 1'20 ptes. l'any si pertanyen a alguna entitat esperantista i 2'50 si no pertanyen a cap.

Abonament al KATALUNA ESPERANTISTO, 3 ptes. l'any.

El Caixer, *Jaume Herp.*